



MUZIKA ESPERANTO- LIGO

MUZIKO

Organo de MEL
FONDITA EN 1963

1994/2

M U Z I K A E S P E R A N T O - L I G O (MEL)

ABONPREZO: US\$ 15 pagita al: UEA konto, kodo: melx-y
aù per via peranto.

REDAKCIO: Milin kamàk 58, 1421 Sofia, Bulgario
redaktoro-Dimitàr Terziev
administranto-Lilian Dokova

Perantoj:

ARGENTINO: C. Tomas, Mariano Eskalada 1378, RA-1684 El Palomar

AÚSTRALIO: K. Andersen 19, Sherley St., Moorooka, Q 4105

AÚSTRIO: G. Cool, Leitringerstr. 53, A-8430 Leibnitz

BELGIO: H. Wauters, Gentse Steenweg 108, B-9300 Aalst

BRAZILIO: BE-Ligo, C. Postal 03625 BR-70084-970 Brazilia, DF

BRITIO: R. Walter, 28 Iver Lane, Iver, Bucks. SLO 9LF

BULGARIO: L. Dokova, Vranja 31, BG-1233 Sofia

ĈEHIO: M. Smyčka, Kojetická 90, 400 03 Usti nad Labem

ĈINIO: Ch. Yong Hua, PO Box 2421-3, Beijing 100081

FINNLANDO: A. Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, SF-20350, Turku 35

FRANCIO: L. Marin, 9 rue Adrien Lejeune, F-93170 Bagnolet

GERMANIO: U. Wilke, Hufelandstr. 31, DO-1055 Berlin

HUNGARIO: A. Besenyei, Szerémi u. 21 IV 20, 1117 Budapest XI

IRLANDO: M. McKay, The Manse, Clonminch, Tullamore, co. Offaly

ITALIO: M. Rosati, Via Forlanini 95, I-34139 Tieste

JAPANIO: Mičiko Takaoka, Honmoku 5-2-106, Naka-ku, Yokohama-si, Kanagawa 231

NEDERLANDO: G. Dercks, Ootmarsumsestraat 47, NL-7607 AX Almelo

NORVEGIO: S. Birkeli, Kyrkjegata 11, N-4200 Sauda

POLLANDO: D. Soska, Spacerowa 5/14, 21-020 Milejow

RUSIO: A. Orlov, p/k 78, 109004 Moskva

SVEDIO: G. Olsson, Gransikegatan 68, 54140 Skövde

SVISLANDO: N. Weiss, Saggiestr. 20, CH-6300 Zug

USONO: David Gaines, 606 St Paul St Box 027, Baltimore MD 21202 - 2355

KARA LEGANTO,

Komencas ni per "DANKON" (majuskle), adresita al multe da ĝentil-homoj.

Al mag.A.Grzebowski, kiu invitis nian redaktoron gvidi "Bulgaran kaj muzikan Seminarion", partopreni AIS-Sesion dum la "Bydgoszczaj Tagoj", printempe '94; al Hilde, Fimke, Maatje - Moraninoj de IEĤ, kiuj gastigis lin en Belgio kaj Nederlando; al dekoj de MEL-anoj el diversaj landoj, kiuj sendis leterojn kaj aliaj poŝtaĵojn kun partituroj-manskribitaj, muzik-libroj, kasedoj, libretoj de operoj,projektoj pri novaj muzik-sistemoj ktp.

Nia MEL-arkivo, biblioteko kaj nototeko ege riĉiĝis. Ni proponas al vi utiligi ilin, mendante kopiojn. Tiucele ni enmetas liston de ricevitaj partituroj dum la kuranta jaro (p.14).

Pasis jam 1994, venas la Nova 1995, al kiu ni rigardas kun espero por plibonigo de la vivo.

ESTU ĜI SUKCESPLENA KAJ FELIĈA POR VI ĈIUJ,
DISE DE LA MONDO !

La redaktoro


ENHAVO:

4. Edo de la 79-a UK.
6. La respondoj de "Muziko-konkurso" No 1.
- 7-10. Muzik-Esperanto heredaĵoj (kun daŭro).
- 8-9. "Tula-tulan" - finnlanda kanto.
11. De lando al lando.
14. Listo kun ricevitaj partituroj.

E Ĥ O DE LA 79-a U. K O N G R E S O

— MEL-KUNVENO EN S E U L O. Malgraŭ ke la prezidanto de MEL ne ĉeestis, MEL-kunveno okazis lunde, la 25-an de julio '94, je la 16-a horo.

Partoprenis 26 gekongresanoj el 10 landoj: Koreio, Japanio, Aŭstralio, Usono, Hinda Unio, Nepalo, Francio, Finnlando, Bulgario kaj Makedonio.



Kompreneble, plej multaj estis koreianoj, inter kiuj estis s-ro Ahn Song-san - la fondinto kaj premiodonanto en branĉo "Kanto" ĉe UEA-Belartaj konkursoj.

Partoprenis la kunvenon konataj MEL-aktivuloj - Louise Marin kaj Jeannine Vincent el Francio. Elkorajn dankojn al ĉiuj ĉeestantoj kaj salutojn al la fervora Jennifer Bishop el Aŭstralio, kiu alsendis informojn kun listo de la partoprenantoj en la MEL-kunveno.

— "VARMIGIS LA ETOSON"...

Dum la Internacia Vespero partoprenis muzikplenumantoj el diversaj landoj:

A.Raĉkauskas - litova tenoro (urbestro de Kaunas) kantis du popolajn kantojn.

Inge Lulofs - nederlandanino, ludis per fluto.

Vida Jerman (Kroatio) plenumis tri kantojn el la kroata poezio.

Kiam la kubanoj J.Hernandez kaj H.Jemenez kun siaj gitaroj ekkantis la faman "Guantalamera", la tuta salono kunkantis kaj ĝoje aplaŭdegis.. (laŭ "Heroldo" 94/11)



Karaj geĥoranoj,

Okaze de la 15-jara JUBILEO de la
INTERNACIA ESPERANTO-ĤORO, ni dediĉu la
tutan jaron-1995 al aktiva Ĥor-kantado en

Esperantujo! Kieajn vi troviĝas, proksime aŭ
malproksime, dise tra la terglobo, povus kontribui
tiurilate: fondu kantgrupon, sendu artikolon al via
loka aŭ regiona gazeto pri Internacia Ĥoro, priskri-
bante viajn impresojn de partopreno iufoje en la ko-
muna kantado ktp.

Se vi partoprenos la 80-an UK en Tampere, nepre
eklernu la publikitan finnlandan kanton "Tula-tulan"
(p.8-9). En la partituro vi devas serĉi la melodion
de via voĉ-partio: soprano, alto, tenoro aŭ baso.

Se ne kapablas ĝuste tralegi la notojn, bonvolu
skribi leteron, por ke ni sendu la koncernan voĉ-
parton, aparte skribita klare kaj legeble. Ne forge-
su, tamen, enŝovi en via registrita letero monbileton
de \$5 aŭ egalan valuton.

En la festa koncert-programo eksonos deko da kan-
toj, festjubleaj kaj amataj je kantantoj kaj aŭskul-
tantoj dum diversaj U.Kongresoj. Vi povas trovi la
notojn de la kantoj en nia bulteno "Muziko" ekde 1990
ĝis nun, ankaŭ en la kantlibro "Kuniĝu ni per nia
kant'" (MEL-1992).

Por helpi la lernadon fare de iuj kantemuloj, via
Ĥorestro intencas dediĉi semajnojn diversloke. En

Stara Zagora, Bulgario (fine de junio '95); en urbo Pomorie (ĉe la Nigra maro), Bulgario (komence de julio '95); en Bydgoszcz, Pollando (8-15 de julio '95) kaj poste veturante kune al Finnlando kun koncertoj en diversaj urboj. La oficiala koncerto okazos en Tampereo dum la 80a UK. Pliajn informojn ĉe la koncernaj organizantoj.

LA RESPONDOJ DE "M U Z I K O"-KONKURSO No 1



1. "La Espero" laŭ melodio de s-ino Claes Adelskolt (1827-1907), svedino.
2. INOUE NOBIKO ludis plane la kongresan melodion laŭ la stiloj de Mozart, Bach kaj Chopin dum la 77a Kongreso de japanaj esperantistoj-1990.
3. SERGEJ IVANOVIĈ TANJEJEV (1856-1915) komponisto, pianisto, pedagogo, skribis sian taglibron en Esperanto dum duonjaro (la 21an decembro ĝis la 28an de junio 1895). Por pliaj informoj serĉu "Esperanto kaj muziko" -elektitaj artikoloj, MEL 1992.
4. De nia MEL-ano GUNNAR GÄLLMO (Tensta Allè 12, SE-163 64 Spånga, Svedio) oni prezentis la spektaklojn "Wolfgangrel" kaj "Einsteinkonfeso el Ŝeolo" en Germanio kaj en Pollando.
5. De DAVID GAINES - komponisto kaj MEL-peranto por Usono estis prezentitaj ĉambromuzikaĵoj en Usono kaj en Brazilo.
6. "La Nefinita"-n de Schubert finis FRANK MERRICK - profesoro de la Reĝa Kolegio de Muziko en Londono kaj konata virtuoza pianisto ĉe B.B.C. kaj aliloke. (Legu la artikolon "Kiel esperantisto finis la Nefinitan" de Johano Rapley en la revuo "Esperanto" 1993/3 p.53-54).

MUZIK - ESPERANTO HEREDAĴOJ

Kiu de vi, karaj legantoj, povus diri ĝuste kiom da komponistoj verkis melodiojn por "La Vojo" de L.L.Zamenhof?

Ni pensas, ke la respondo ne estas tiel facila. Ekzistas multaj komponaĵoj sub la titolo, sed ne ĉiuj estas publikitaj, kaj se iuj estas publikitaj, ne ĉiuj esperantistoj eksciis pri tio. Abundas diversaj opinioj: jen ni legis en revuo "Esperanto" 94/4, p.74 artikolon "Himno", de ÂRPÂD RÂTKAI (Hungario), en kiu oni asertas, ke "neniu komponis muzikon al tiu poemo" ..sed en "Esperanto" 94/7-8 p.130 JEAN AMOUROUX (Francio) mencias kvar komponaĵojn por "La Vojo": de Rene Deshays, de H.Botting en Britio (1905), de Witte-ryck en Belgio kaj de R.G.Tromblin en Londono (1906). Aldone li skribas: "Leginte la artikolon de Ârpâd Râtkai mi tuj verkis la ĉi-kunan muzikon, kaj mi proponas ĝin al la tuta esperantistaro. Faru kun ĝi, kion vi taksos bona! Jen do, la (minimume) kvina melodio por "La Vojo" ... (sekvas la notita komponaĵo sur p.130)

Ĉe ni, en la redaktejo de "Muziko" alvenis letero de W.G. ATKINSON (Britio): "Kara prof. Terziev, antaŭ kelkaj tagoj mi sendis artikolon al la redaktoro de revuo "Esperanto", por eventuala aperigo. Ĉi-kune mi sendas du fotokopiojn: de la artikolo kaj de la partituro de FRANK MERRICK por "La Vojo". Eble iam estos ebleco taŭge prezenti ĝin (senakompane) dum UK. Mi scias nenion pri kopirajto de la verko kaj mi ne plu havas kontakton kun familio Merrick. Kore salutas, Wilf Atkinson.

Jen la enhavo de la menciita artikolo:

/ daŭrigo al p. 10 /

Tuulantei

San. TEUVO PAKKALA

T U L A T U L A N ...

Säv. OSKAR MERIKANTO
Sov. Seppo Ilvö

p Tu-la tu-lan tu-li tu-li tej en öi mon-do mi a-mas vin
tu-li tej.
tu-la tu - lan tu-lan tej *mp* en öi mon-do mi a-mas vin

plej mi-a be-ro, bir-de-to kaj öar-ma la flor' mia plej bri-le o-ra vi
plej mi-a be - ro, öar-ma la flormi-a plej bri-le o-ra vi

es-tas tre-sor' ki-on vo-lus mi plu de la sor-to tu - tu - lan
tu-la tu-lan tu-li-tu-li
es-tas tre-sor' ki-on vo-lus mi plu de la sor-to *mp* li-tu-li tu-lan
p *rall.* *a tempo*

tu-lan tej tu - lan tej ki - a es-tu sort'
 tej ku-ne vi-vas ni en ko-lom-bej! Es-tu kia ajn fro-s-to, su-fe-ro, res-tas
 tu-lan tej vi-vas ni en ko-lom-bej, ki-ajn frost', es-tu sort'
 es-tu

be - la vi-vo ĝis mort', se-re-na la ta-go, ves-pe -ro.

be-la, fe-li-ĉa la vi-vo ĝis mort', se-re-na la ta-go, ves-pe-ro.

be-la, fe-li-ĉa la vi-vo ĝis mort', se-re-na la ta-go, ves-pe; - ro.

p

ff

Tula tulan tuli tuli tej, en ĉi mondo mi amas vin plej.
 Mia bero, birdeto kaj ĉarma la flor',
 mia plej brile ora vi estas trezor'.
 Kion volus mi plu de la sorto!

Tula tulan tuli tuli tej, kune vivas ni en kolombej'.
 Estu kia ajn frosto, sufero aŭ sort',
 restas bela, feliĉa la vivo ĝis mort',
 serena la tago, vespero.

/daŭrigo de p.7/

" Mi povas aldoni du komponaĵojn al la listo jam aperinta en "Esperanto" (jul.aŭg.94 p.130).

Iam post la morto en 1942 de brita orgenisto Leonard Harding, lokaj esperantistoj aperigis presitan kantfolion kun muziko por "La Vojo". Ĝi estas kompetenta verko, taŭga por komuna kantado, sed ne tre inŝpira. La dua ŝajnas al mi multe pli valora, sed bedaŭrinde ĝi neniam eldoniĝis.

Baldaŭ post la dua mondmilito, la eminenta angla pianisto kaj komponisto Frank Merrick (1886-1981), (vidu la artikolon de Johano Rapley en "Esperanto" marto 1993, p.53) komponis muzikon por "La Vojo" por neakompanata gea ĥoro. Esence ĝi estas por kvar voĉoj, multloke unu el la subaj partoj duiĝas.

Merrick lerte uzas la duan strofon kiel rekantaĵon, sed traktas la tri aliajn strofojn individue. Li tre trafe esprimas la signifon de la teksto per la muziko, kies ĉefa aparta allogo estas la riĉaj harmonioj. Lia revo iam aŭdi prezenton fare de granda profesinivela ĥoro, malfeliĉe, ne realiĝis. Mi posedas unu el la versajne malmultaj originalaj fotokopioj de la partituro. Merrick, fervora esperantisto, ankaŭ komponis ĥoran muzikon por la 23a psalmo kaj pli ol dudek solokantojn por originalaj esperantaj poemoj de diversaj aŭtoroj, kun brile komplementaj akompanaĵoj por piano.

W. Atkinson

Notoj de redakcio:

Ni povas aldoni la komponaĵon "La Vojo" de Friese Moolenaar (1881-1965) - nederlanda komponisto, orgenisto kaj instruisto en muziklernejo. Vidu "Muziko" n 93/1, p.11.

Konklude, ni proponas: Se estas inter vi, karaj legantoj, esploremaj homoj, iu deziranto povus prepari artikolon, traktanta la senmortajn versaĵojn de Zamenhof kaj ties melodioj kaj muzikaĵoj, konataj kaj nekonataj al la esperantistaro ĝis nun, estus interese por ni ĉiuj, ĉu ne?

De lando al lando...



B U L G A R I O

Dum junio '94 vizitis Bulgarion s-ro David Gaines, komponisto kaj MEL-peranto por Usono. Okazis emociplena renkontiĝoj kun esperantistoj el Sofio, Pazarĝik kaj Stara Zagora.

Dum la renkontiĝo en Sofio eksonis unuafoje la speciale verkita kaj komponita de Gaines muzikaĵo "Povas plori mi ne plu", dediĉita al la civitanoj de Bosnio kaj Hercegovino, prezentita de Sofia Esperanto-Horo.

En Pazarĝik la usona gasto vizitis interesajn vindindaĵojn-historiajn preĝejon kaj muzeon, renkontiĝis kun esperantistoj, Ĥoraninoj de virina Esperanto-Horo kaj lokaj ĵurnalistoj.

En Stara Zagora D.Gaines partoprenis la Sepan Internacian Muzik-seminaron per prelego pri siaj propraj komponaĵoj kaj pri aliaj nuntempaj usonaj komponistoj.

Ege sukcesa estis la kontakto inter D.Gaines kaj prof.Georgi Kostov, rektoro de la Muzika Akademio de Sofio. Oni interŝanĝis simfonio-partiturojn kun espero, ke baldaŭ eksonos bulgaraj ritmoj kaj intonacioj en Usono kaj usonaj en Bulgario. Tia estis la ĝenerala celo de la vizitanto kaj tia ĝi estas la trajtoj de la lingvo Esperanto!

Dum la tuta 10-taga vizitado akompanis la gaston lia bulgara kolego kaj amiko prof. D.Terziev, prezidanto de MEL kaj Ĥorestro de la Internacia Esperanto-Ĥoro.

J A P A N I O

Tre esplorema estas la 16-jariĝa lernantino de Sanyo Virina Altlernejo MIKA MIZUUCHI (Fukuda 313-36 Okayama-si, 702 Japanio), kiu lige kun ekspozicioj en lernejo, okaze lernejaj festoj, dissendis leterojn al diversaj landoj kun informpetoj :

Pasintjare (1993) - je la temo: "Tradicia muzikilo" (Nomo de la muzikilo; bildo aŭ foto; kiel oni ludas; materialo ktp.)

Ĉi-jare (1994) la temo estas: "Tradicia Vestajo" (Nomo de la vestajo; bildo aŭ foto; kiam oni metas; kion oni faras en tiu kostumo).

Estus interese por niaj legantoj, legi artikolon pri la rezultoj de tiuj enketoj, kaj ni tre ĝentile petas Mika Mizuuchi nepre fari tion! Antaŭdankon!



V E N E Z U E L O

Venis letero: "...Bonorde ni ricevis la numeron de "Muziko" 94/1 kaj ni legis ĝin kun grandega intereso.

"Muziko" estas vere tre bona bulteno. En ĝi ni legis la leteron de Maire McKay (Irlando) pri la muzika lingvo "Sol-re-sol". Ankaŭ ni sentas intereson pri ĝi kaj petas informon pri la vortaro kaj gramatiko de tiu lingvo..."

(David G.Valecillos, Calle 79, N-ro 3, C-72,
Maracaibo-4002 (ZULIA) Venezuelo)

NI EKSCIAS KE:

ROK-
gazet'

— Nia frata muzikrevuo " ROK-GAZET' "— Francio, estas premiita (\$264) de la Fondaĵo Grabowski pro meritaj kulturaj aktivaĵoj.

Varme ni gratulas ĝin !

— Neniu premio estis aljuĝita en branĉo "KANTO" de BELARTAJ KONKURSOJ - 1994, ĉar neniu valida konkursaĵo ĉi-jare partoprenis.

— La germana esperantista muzikisto FRANZ+GEORG RÖSSLER (Jakobsgasse 11, D-67376 Harthausen) verkis en 1990 kantaton "Evoluo" laŭ esperanta teksto de Rickardo Ŝulco. Per tiu komponaĵo la Ĥoro "Mainzer Figuralchor" akiris la unuan premion en konkurso de la plej bonaj germanaj Ĥoroj, maje - 1994.

Gratulon al la Ĥoro kaj al la aŭtoro !



" PER FLUGILOJ DE LA KANTO "

Jam aperis bulgarlingve la libro pri

INTER-
NACIA
HORO

kaj ties fondinto kaj gvidanto. Dezirantoj, sendu monbileton-\$5per registrita letero al: MEL, Milin kamak 58, 1421 Sofio, Bulgario

Rok-Gazet'-abonilo

EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE

Francio
tel. +33 61 81 95 65

Abono kostas 100 FRF; 35 NLG, aŭ 26 IRKP (13 USD por netranspagovilandoj), kaj validas por 4 numeroj.

Familia nomo: -----
Persona nomo: -----
Asocio: -----
Adreso: -----



PARTITUROJ ← MANUSKRIBITAJ

ricevitaj dum la 1994

Nomo de partituro	Aŭtoro	Lando	Sendis:	N-ro en MEL-arkivo
1. <u>KVIN MINUTOJ</u> (Novjara kanto) el filmo "Karnavala nokto"	m.A.Lepin t.V.Lifšic	Rusio	A.Masiukas	I-41/94
2. <u>KYRIE</u> op.4 kaj aliaj pecoj; sentonala, seria musiko	Fr.Moussset	Francio	La aŭtoro	I-47/94
3. <u>AERLUMO</u> -(titolkanto)	F.Fonseca	Brazilo	La aŭtoro	II-147/94
4. <u>POVAS FLORI MI NE PIU</u> (gea Roro)	David Gaines	Usono	La aŭtoro	II-149/94
5. <u>AMO ESTAS VERA MIRINDAĴO</u> (gea Roro)	m.Sammy Pain t.Fr.Webster	Brazilo	Heringue Braga	III-218/94
6. <u>JEN MIA VIENO</u> (2-voĉa kanto)	m.H.Strecker ti.Z.Warmus esp.M.Palka	Pollando	Z.Warmus	III-236/94
7. <u>LA VOJO</u> -(por gea neakompanita Roro)	m.Fr.Merrick t.L.Zemenhof	Britio	W.Atkinson	III-239/94
8. <u>KANTO DE MIA KORO</u> (gea Roro)	m.J.Sibelius	Finnlando	Anna-Liisa Ali Simola	IV-271/94
9. <u>TULA-TULAN...</u> (gea Roro)	m.O.Merikanto t.T.Pakkala	Finnlando	Anna-Liisa Ali Simola	IV-271/94

N.B. Vi povus ricevi kopion kontraŭ monbileto de \$5, sendita per
registrita letero al: MEL-redakto, str.Milin kamk 58
1421 Sofia, Bulgario



Por vi, MUZIKISTOJ kaj INSTRUISTOJ

Esperanto kaj muziko. Elektitaj artikoloj de muzikistoj-esperantistoj. Komp. Dimitar Terziev. Sofia: Muzika Esperanto-Ligo, 1992. 75p. 20cm. Variaĵtemoj de "La genezo de la popolkantoj" ĝis muzika edukado.

Muzika terminaro (1944). M. C. Butler, F. Merrick. Kun alfabela indekso de David G. Hill. Sofia: Muzika Esperanto-Ligo, 1992



Kunigu ni per nia kant'. 12 floriaj kantoj okaze de la 10-jara jubileo de la Internacia Esperanto-Horo. Komp. D. Terziev. Sofia: Muzika Esperanto-Ligo, 1992. 47p. 29cm. Partituroj kaj voĉpartaj eltroj por soprano, alto, tenoro kaj baso.

Abonu kaj abonigu "M U Z I K O"-n

- MOVADA INTERLIGILO !



MEL-membreco kaj abonkotizo- US\$15 per UEA-konto melx-y aŭ ĉe la redakcio-str. Milin kamàk 58, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Malgraŭ ke la prezoj plialtiĝas tutmonde, nia abonkotizo restas la sama.

Se vi, kara leganto, estas finance embarasita, bonvolu skribi al ni, aŭ

sendu monon laŭ viaj eblecoj.

Sed, varme bonvenigas ni ĝentilulojn, kiuj povus helpi al supremenciitaj MEL-anoj ĉi-riilate.

La plej ofta...

Eventoj

Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj!
Aparas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj...
Pala subprezo provekzemplara:
EVENTOJ, pà. 87. N-1675 Budapeŝto, Hungario

B U L G A R A E S P E R A N T O -- C E N T R O

Organizo por utiligo de Esperanto.

J.k.Zapaden park, bl.22, tel.(02)21-08-24

1373 Sofia, Bulgario



I N T E R N A C I A E S P E R A N T O
F E S T I V A L O (1-5 julio 1995)

Loko: La Nigramara urbo Pomorie, Bulgario

Alventago: 01,07,1995; forveturo: 06,07,1995

Tranoktado: En 2-litaj privataj ĉambroj.

Partoprenantoj: Esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj ŝatas ripozi en ĉarta amatora medio. Ĉiu rajtas prezenti almenaŭ unu kanton aŭ recitaĵon, ankaŭ nacia programon.

Senpage viziteblaj: Samtempajn aranĝojn; Simpozio pri Esperanto; Balkana E.Konferenco; Junulara renkontigo; Ekspozicio-bazaro; ekskursoj ktp.

Prezoj: ĝis la 28a de februaro '95 - ĉirkaŭ \$50
ĝis la 31a de marto '95 - ĉirkaŭ \$55
ĝis la 30a de aprilo '95 - ĉirkaŭ \$60
ĝis la 31a de majo '95 - ĉirkaŭ \$75

Rabato: Por certiganto de 10 personoj - 30%/o

Aldonaj eblecoj: Feri antaŭ aŭ post la festivalo - \$12 potage.

Pliajn informojn petu je la supre indikita adreso.